SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio
El Vol. 27 n-ro 2/3(118/119) 30.06.1976

RUDOLF HAFERKORN OKDEKJARA

La 21an de aŭgusto 1976. dipl.inĝ. Rudolf Haferkorn en Weiden (Oberpfalz, F. R. G.), longjara gvidanto de la Terminologia Centro de ISAE, finis la okdekan vivojaron.

En 1920, kiam li estis studento ĉe la Teknika Altlernejo Dresdeno, li aŭtodidakte lernis Esperanton, ĉar li ekscis, ke ĉi tiu lingvo estas facile lernebla kaj taŭga por rompi la lingvobarojn inter la popoloj, kaj ke ĝi disponas la vortojn ne nur de la ĉiutaga, sed ankaŭ de la altnivela lingvo, kaj ke ĝi kapablas formi eĉ specialfakajn terminojn.

Pro ĉi tiu konvinko li kontaktiĝis tuj post la dua mondmilito kun la unua delegito de ISAE por Germanujo (F.R.G.), la kemiisto d-ro Kurt Dellian en Munkeno, aliĝis ISAE'n kaj komencis intensan agadon por la Internacia Lingvo, speciale en la terminologia kampo. Jam en la unua numero de la reviviĝinta 'Scienca Revuo' (1949, Vol. la) aperis artikolo el la plumo de Haferkorn pri "La Dekuma Klasado". Per multaj pluaj kontribuaĵoj en ĉi tiu organo de ISAE li pritraktis terminologiajn problemojn. En 1954 li fariĝis Delegito de ISAE por Germanujo, do nun estis posteulo de Dellian. Kune kun Dellian kaj en kunlaborado kun la usona fizikisto prof. Belinfante li verkis la "Sciencan kaj Teknikan Terminaron" (STT), kiun la Japana Esperanto-Instituto eldonis en 1956. Kiel la "Plena Vortaro" ĝi estas difinvortaro, sed krome ĝi enhavas la anglajn, francajn, germanajn kaj kelkloke la latinajn tradukojn. Tutkompreneble la STT povis pritrakti ne ĉiujn fakojn; ĝi nur intencis fariĝi la bazo por estonta pli ampleksa verko, do vera "Plena Scienca kaj Teknika Terminaro".

STT turnis la atenton de prof. G.Waringhien al sia verkinto. Waringhien ja tiam ekiĝis prepari la manuskripton de la jam de longe projektita kaj urĝe bezonata "Plena Ilustrita Vortaro" (PIV). Pro tio li invitis s-anon Haferkorn, gvidi la teknikan-sciencan parton de tiu projektita verko, tio signifas kolekti la kontribuaĵojn de la diversaj esperantistoj-fakuloj kaj fine redakti la presotan manuskripton de ĉi tiu specialfaka parto. Haferkorn akceptis, kaj post plurjara intensa laboro li finpretigis en 1960. tiun manuskripton en formo de sliparo kaj sendis ĝin al la ĉef-redaktanto.

Jam en 1957. oni elektis lin membro de la Akademio de Esperanto kaj en 1958. li fariĝis la Direktoro de la Terminologia Centro de ISAE kaj de la Akademia 'Sekcio pri la Teknika Vortaro'. Tiam li decidis, transdoni la postenon de 'delegito de ISAE por Germanujo' al alia membro de la germana ISAE-filio, ĉar tiuj novaj oficoj postulis multspecajn terminologiajn laborojn en ISAE kaj en la Akademio.

Kiel apuda produkto de la kompilado de la teknika-scienca parto de la PIV estiĝis fine de 1967. lia malgranda "Technisches Wörterbuch Deutsch-Esperanto", kiun pliriĉigis kaj eldonis Rüdiger Eichholz en Kanado, la nuna direktoro de la Terminologia Centro.

Antaŭ ses jaroj Rudolf Haferkorn metis siajn gvidantajn funkciojn en pli junajn manojn, sed ĉiam ankoraŭ li antaŭenpelas la fakvortaran aferon, verkas artikolojn, faras terminologiajn proponojn kaj helpas la kunlaboremulojn. Lia ĉefa zorgo estas, trovi taŭgan posteulon por la ellaborado de la Telekomunikada Vortaro, kio estas tre grava por li, ĉar li estas emerita oficisto de l'telekomunikada servo de l'germana poŝto. Ni esperu, ke li sukcesos en siaj ĉirilataj klopodoj.

Ni deziras al nia samideano Rudolf Haferkorn je la okdeka datreveno de lia naskiĝo sanon, feliĉon kaj ĝojon en plua agado por nia lingvo.

G.Kalckhoff